**N I A  V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2003**

**FIGHIERA PREMIITA**

La Asocio de Profesiaj Kongres-Organizantoj (AIMP) asignis la prestiĝan premion Marco Ferronato 2002 al G.C. Fighiera por lia kontribuo al la evoluado de la prokongresaj sciencoj kaj teknikoj. Li aperigis ses librojn kaj 15 monografiojn- en la itala, franca kaj esperanto- pri la kongresaj merkato, produkto, manaĝerado kaj organizado.

**MARCOS INTERVJUITA**

La loka radiostacio "Radio Economía" en Munguía (Vizcaya) prezentis duonhoran intervjuon pri esperanto kun la vicsekretario de HEF, Marcos Cruz.

**MADRIDO**

Kadre de la programo "Encrucijada de Culturas" la "Dirección Gral. de Promoción Educativa" de la Madrida Aŭtonoma Komunumo, kontaktis HEF por peti la tradukon al esperanto (Jorge Camacho faris) de poemo originale verkita en la sefarda. La verko estis tradukita en dudekon da lingvoj.

En la ekspozicio "Tres siglos de la historia de Madrid. C.C. de la Villa" mankas la portreto de la esperantisto Cayetano Redondo Aceña, urbestro de Madrido de novembro 1936 al majo 1937. Oni ne povis fari al li oficialan portreton… cxar li estis mortpafita tuj post la fino de la milito. En la numero januaro/februaro de "Boletín" aperas foto, neniam antaŭe publikigita, kiun peris al HEF la Fundación Pablo Iglesias.

**NOVA REZOLUCIO DE NEREGISTARAJ ORGANIZOJ FAVORE AL ESPERANTO**

CONGO (Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj), la unuiĝo de la organizaĵoj en oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, 9-13-an de decembro 2002, kunvenigis siajn membrojn por la azia kunsido, Azia Civil-Socia Forumo (ACSF) en UN-domo en Bangkok, Tajlando. En la forumo partoprenis vicprezidanto de UEA Prof. Lee Chong-Yeong. Laŭ la speciala peto de Prof. Lee la 11-an de decembro al la programo de ACSF estis aldonita aparta ronda tablo pri "Lingvo kaj Homaj Rajtoj". Ĉirkaŭ 40 reprezentantoj de diversaj neregistaraj organizaĵoj partoprenis la kunsidon, kiu okazis konkurence kun 4 aliaj kunsidoj. Prof. Lee prelegis dum 30 minutoj pri "Lingvo kaj Internaciaj Homaj Rajtoj", poste dum ĉirkaŭ 1 horo okazis diskuto. Rezulte la grupo akceptis kaj transdonis al la organizantoj rekomendojn favorajn por Esperanto. La rekomendoj estos inkluzikvitaj en la plena raporto de ACSF 2002. La konkluda parto de la rekomendoj diras:

"... Ronda tablo III, "Lingvo kaj Homaj Rajtoj ... rekomendas, ke:

1. UN, speciale ECOSOC (Ekonomia kaj Socia Komisiono), enmetu la tagorderon "Lingvo kaj Homaj Rajtoj" en tagordon de unu el ĝiaj venontaj asembleoj, por diskuti la mondan lingvan politikon, lingvajn aspektojn de homaj rajtoj, kaj la administran neefikecon kaŭzitan de lingva malsameco, kun la celo konsideri novan internacian lingvan ordon,
2. Komisiono de UN por Homaj Rajtoj establu laborgrupon por studi la problemojn de lingvaj homaj rajtoj kaj la malobservado de homaj rajtoj pro lingva malegaleco kaj maljusteco, kaj Internaciaj neregistaraj organizaĵoj subtenu la agadon de la Koalicio por Internacia Helplingvo de Neregistaraj Organizaĵoj, kaj konsideru eksperimente en ilia ĉiutaga komunikado kun iliaj internaciaj membroj uzon de etne neŭtrala internacia helplingvo, kiel Esperanto."

**ESPERANTO EN INTERRETO** Antaŭnelonge aperis en Interreto nova portalo en Esperanto, kiu ofertas ĉiutage freŝajn novaĵojn pri monda politiko kaj pri nia lingvo. Ankaŭ oni povas ludi rete kun ĝia automato: http://www.gxangalo.com

**NIA VOĈO**
**MARTO 2003**

Gazetaraj komunikoj. La individuaj membroj, kiuj deziras rekte ricevi la gazetarajn komunikojn, bv. sendi mesaĝon al gazetaraj.komunikoj-request@co.uea.org kun nur la vorto *subscribe* en la temlinio kaj nenio (eĉ ne la subskribo) en la korpo de la mesaĝo.

**MEMBRARA BILANCO**

UEA. Fine de 2001 Hispanio havis entute 490 membroj de UEA (143 IM kaj 347 AM)
HEF je la fino de 2002: membro-nombro 366 inter ili 1 infano, 29 junuloj, 14 patronoj, 3 honoraj (Gumá, de Diego kaj Moya), 32 dumvivaj kaj 18 grupoj.

**KURSO EN MADRIDO**

Entreprenisto Juan Abad de hispana firmao pri telekomunikado INALTEL senmonprofite oferis sian firmaan lernoĉambron por ke liaj dungitoj lernu Esperanton. HEF kaj MEL aranĝis tri monatan bazan kurson, kiu komenciĝis la pasintan 3an de februaro. Klasoj okazas ĉiuj merkredoj inter la 18'00 kaj la 20'00 horoj, ĉe strato Celanova 9. La kurson ĉeestas 15 gelernantoj (8 inaltel-anoj plus 7 pliaj ne apartenantaj al tiu firmao). Lernolibro de Adúriz estas uzata. Gvidas la kurson Juan A. del Castillo.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj: 17-a de marto. 19,00h. “Kiu verkis la Biblion?”. Pepe Platas

**Lumbildoj: 7-a de marto. VENDREDO, 20,00h en CASA DE GUADALAJARA, Plaza Santa Ana 15.“Chile, el abrazo al Pacífico”. Lupe Sanz**

**GRANDA VORTARO**

Profitante la bonegan prezon por antaŭmendo, MEL jam petis 30 ekzemplerojn de la "Gran Diccionario Español-Esperanto" de Fernando de Diego. La hispana vortaro tre similos al la "Nova PIV" laŭ nombro da paĝoj kaj formato. La fina prezo estos nur 45 eŭroj. La vortaro estos prezentita al la publiko en julio dum la Hispana Kongreso de Valencio.

**KOTIZO POR 2003**

La MEL-kotizo por la jaro 2003 estas sama ol la lastaj naŭ jaroj (12 EUROJ). BV. pagi ĝin

per **ĉeko po 12,90 eŭroj** (inkludas bankkostojn), je la nomo de Esperanto-Liceo de Madrid

per banko: Banco Atlántico: 0008/0110/97/1120/404200, (sama nomo)

rekte al la kasisto lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Marzo 2003

Como ya sabes, en la última Asamblea se acordó sortear 5 ejemplares del nuevo diccionario español-esperanto de Fernando de Diego, la condición para entrar en el sorteo es tener abonadas las cuotas del Liceo de los años 2001, 2002 y 2003.

El sorteo lo haremos el 17 de marzo en nuestra reunión en Rodríguez San Pedro 13.

Si quieres que tu número de socio "entre en el bombo" tienes que abonar tu cuota antes de ese día. Lo pueder hacer:

**.- por cheque (12,90 euros) a nombre de Esperanto Liceo de Madrid**

**.- por transferencia o ingreso (12,00 euros) en cuenta a nombre de Esperanto Liceo de Madrid:**

**Banco Atlántico 0008 0110 97 1120 404200**

**.- directamente al cajero (12,00 euros) en nuestra reunión de los lunes**

**HASTA PRONTO**

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Marzo 2003

Como ya sabes, en la última Asamblea se acordó sortear 5 ejemplares del nuevo diccionario español-esperanto de Fernando de Diego, la condición para entrar en el sorteo es tener abonadas las cuotas del Liceo de los años 2001, 2002 y 2003.

El sorteo lo haremos el 17 de marzo en nuestra reunión en Rodríguez San Pedro 13.

Si quieres que tu número de socio "entre en el bombo" tienes que abonar tu cuota antes de ese día. Lo pueder hacer:

**.- por cheque (12,90 euros) a nombre de Esperanto Liceo de Madrid**

**.- por transferencia o ingreso (12,00 euros) en cuenta a nombre de Esperanto Liceo de Madrid:**

**Banco Atlántico 0008 0110 97 1120 404200**

**.- directamente al cajero (12,00 euros) en nuestra reunión de los lunes**

**HASTA PRONTO**